WIKIPEDIA

Zazaa lingvo

La Zazaoj estas etna malplimulto en orienta Turkio. Ilia lingvo, *Zazaki*, estas proksime parenca al la Irana lingvaro. La plej proksima parenco estas la sorana lingvo aŭ "centra kurda lingvo". La gorana lingvo foje konsideratas membro de aparta subgrupo de la irana lingvaro, kun la zazaa lingvo.

Dialektoj kaj lingvokodoj

La lingvokodo por la zazaa lingvo estas **zza** laŭ ISO 639-2. ISO 639-3 havas ankaŭ apartajn kodojn por du el la ĉefaj regionaj variantoj, la suda, aŭ dimla, kode **diq**, kaj la norda, aŭ kirmanĵla, kode **kiu**. Ial, la zazaa Vikipedio uzas la dimlan kodon, dum la priskribo ĉe *Ethnologue* uzas la kirmanĵlan kodon. Ial, la centra varianto ne havas apartan kodon.

Eksteraj ligiloj

- Pri Zazaa lingvo (http://www.ethnologue.org/show_language.asp?code=kiu) en Ethnologue (angle)
- la retejo (http://www.ethnologue.com/subgroups/zaza-gorani) *Ethnologue* pri la zazaa
- Zazaki.net: zazaa kultura retejo (http://www.zazaki.net/)
- retaj ligiloj al zazalingvanoj (http://zazasiteler.tr.gg/)
- akademia esplora centro pri la zazaa (jen germane (http://zazaki.de/) kaj angle) (http://zazaki.de/english/index.htm)
- la zazalingva vikipedio (https://diq.wikipedia.org)
- *"Zazaki Kozmos"*, zazaaj novaĵoj (http://www.zazakikozmos.org)

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Zazaa_lingvo&oldid=6489704"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 08:15, 14 dec. 2018.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.